

## KIO ESTAS I. S. A. E.?

**Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)** estas organizaĵo de esperantistoj por pli forta penetrado de Esperanto en sciencojn kaj teknikon kaj por la disvastigado de sciencaj kaj teknikaj scioj inter esperantistoj.

La **membro** de la asocio povas fariĝi ĉiu esperantisto kun la fakultata instruisteco. Sed ankaŭ aliaj esperantistoj dezirantaj subteni la celojn de la asocio povas aliĝi kiel **apogantaj membroj**. Por ambaŭ kategorioj de membroj la **jarkotizo** estas la sama: 10 steloj minimume (1 us. dol. = 14 steloj; 1 angla ŝil. = 1,7 st.; 1 ned. gld. = 4 st., ktp.).

Krom la pagado de la membrototizo, ĉiu membro devas aboni Sciencon Revuon (aŭ la revuon de la faka sekcio, se tia ekzistas). La kotizojn kaj la abonojn kolektas la **landaj delegitoj** de ISAE (vidu la lastan paĝon).

La **Komitato** de ISAE konsistas el elektitaj komitatanoj el diversaj landoj (kun minimume 5 membroj) kaj de la reprezentantoj de la sekcioj. La Komitato skribe estas konsultata nur pri la plej gravaj problemoj de la asocio. La aktualajn problemojn decidas la **Estraro**, elektata de la Komitato. La nuna **prezidanto** de ISAE estas Prof. D-ro Y. Väisälä (Puolalanpuisto 1, TURKU, Finnlando), unu el 12 membroj de la Finnlanda Akademio de Sciencoj. La ĝenerala sekretario estas Prof. Boj. Popović (Ognjena Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio).

La membreco estas individua, sed la membroj el unu lando povas esti organizitaj kiel **landa filio** de ISAE. Tiaj filioj nun ekzistas en: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio (okc), Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Novzelando kaj Sovetunio.

La membroj de ISAE el unuopaj fakoj povas unuiĝi en **faka sekcio**, kiel memstara sekcio de ISAE, eĉ kiel memstara societo (kies ĉiuj membroj devus esti individuaj membroj de ISAE). En la nuna momento tiaj sekcioj estas:

- arkitekt-konstruista
- medicina
- filologia
- geologia
- astronomia
- teknikista

Krom tio STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) estas **studenta sekcio** de ISAE. La membroj de STELO povas (sed nur pere de STELO) aliĝi kiel junaj individuaj membroj de ISAE (ili pagas nur **duonon** de la jarkotizo).

La sekretario de ISAE troviĝas ĉe la ĝenerala sekretario (prof. B. Popović Ognjena Price 80, Beograd, Jugoslavio).

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,  
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

598.2:632.931 + 632.95

**BIRDETOJ KIEL EKSTERMANTOJ DE INSEKTOJ**  
(C. Stop-Bowitz, Universitato de Oslo, Norvegujo.)

(Prelego en la Internacia Somera Universitato, Helsinki, 1969.)

Pri la rolo de birdetoj kiel ekstermantoj de domaĝaj insektoj en la arbaro regis, kaj parte ankoraŭ regas, tre diversaj opinioj. Krom birdetoj precipe la araneoj ludas tiurilate gravegan rolon, kaj la proporcio inter la efikoj de la du grupoj de ekstermantoj estas tre malegale taksata. La tre diverĝantajn opiniojn kaŭzis antaŭ ĉio la fakto, ke oni sciis tro malmulte pri la ekologio de la birdoj, t. e. pri iliaj nutrokutimoj, nutrajbezono, la denseco de la birdaro k.t.p. Alia kaŭzo estis ke la esploroj faritaj donis rezultatojn, kiuj montris en diversajn direktojn. Kaj birdetoj kaj domaĝaj insektoj konsistigas heterogenajn grupojn de specioj, kaj ĉiu grupo havas siajn apartajn ecojn, tiel ke izolaj, unuopaj esploroj ofte donas malegalajn rezultojn. Tria kaj grava punkto estas, ke sentimentaj vidpunktoj certe ludis konsiderindan rolon.

**Moderna arbarflegado kaj la birdaro.**

Moderna arbarflegado okazas laŭ la principo de optimuma denseco. Je la finrikolto la arbaro estas forhakata komplete sur grandaj areoj, kiuj poste estas rapide priplantataj, aŭ la renoviĝo baziĝas sur la semarboj. Ne hakmaturan arbaron oni plurfoje maldensigas por pligrandigi la utiligeblan alkreskaĵon, kaj por utiligi lignon, kiu alie perdiĝus.